

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Febr. 1945

33 årg. Nr 2

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

DAGENS STORA UPPGIFT.

Ett huvudtema på nästa klubbmöte.

Vi kunna inte blunda för att klubarbetet går trögt och inte ger samma stora resultat som förr. Med stora resultat av klubarbetet måste vi mena 1) en mer och mer trimmad kärna av esperantotalande och esperantostuderande samt 2) en ständig tillströmning av nya esperantister.

Räckte det med det första skulle vi kanske känna oss någorlunda tillfreds med det nuvarande tillståndet (ty klubbarna arbeta ju alltjämt och låta inte medlemmarna slippa undan träningen i att använda språket). Men det räcker inte med det första. Det andra måste till, och där är marken mera hårdarbetad.

Hur många klubbar ha nybörjarkurser i gång?

Den frågan borde nu som förr besvaras med, att det har givetvis alla klubbar, men vi veta, att det tyvärr inte förhåller sig så. — Vi ha ej nu som förr att erbjuda den intresserade den omedelbara eller åtminstone snabba praktiska användningen av esperanto genom uppsjö på korrespondenter i vilket främmande land han än kan önska, eller genom utländska gruppresor i esperanto-organisationernas regi eller genom en flödande esperantopress eller ständigt nyutkommande litteratur på esperanto.

Den som vill börja studera esperanto, får vänta med att praktiskt använda sina kunskaper, till dess gränserna på nytt öppnas för fri trafik ut i världen. Alldeles utan förbindelser utåt ha vi inte varit under kriget och äro det ej heller nu, men man har fått och får alltjämt sök efter vägar. Det har satts andra lås för grindarna än de, som esperanto förr så lekande lätt kunde öppna.

Men den dag nalkas, då dessa lås tagas bort, och då blir det värdefullt att tillhöra de esperantokunniga, som kunna storma fram för att ta den värld i besittning, vilken borde vara allas, det fria tankeutbytets värld utan spärr av språkgränser eller politiska gränser.

Visst är framtidsperspektivet lockande, men dagens händelser tycks göra detta perspektiv överkligt, och det omedelbara resultatet för oss är tyvärr: alltför få eller inställda nybörjarkurser.

Så mycket mera aktningsvärda äro alla de försök att hålla undervisningen i esperanto i gång, som klubbarna göra, och särskild uppmärksamhet måste ägnas den nya kursform, vilken börjar ta gestalt inom ramen för ungdomens fritidssysselsättning inom skolornas regi.

Här skulle vi önska att få några rapporter både om för-

sök som lyckats och försök som misslyckats. Av båda slagen ha vi mycket att lära.

*

Vidare ha vi att anteckna de nystartade eller fortsatta kurserna för folkskoleelever. Här ha vi kanske att hälsa det mest framgångsrika arbetet, som våra klubbar bedrivit det senaste året. — Ja, säger den som tror sig initierad, visst är det glädjande att ungdomen rycks med, men klubbarnas förtjänst i vad som gjorts kan inte vara så lysande. — Vi förstå vad han menar. För att få folkskolekurser i gång, fordras att man har rätt lärare i rätt skola. Det behövs både en intresserad lärare på platsen och en förstående skolstyrelse på samma plats. Alla klubbar äro inte lyckliga nog att inom sina ramar äga båda dessa värden.

Först en fråga till klubbarna. Har ni ordentligt inventerat edra tillgångar i detta avseende? Har så skett, och resultatet är negativt, återstår emellertid i alla fall ytterligare en möjlighet för klubben.

Och det var dit vi ville komma.

Klubbar, som inte lyckats få till stånd en folkskolekurs inom sitt område, kunna göra mycket ändå för att sporra intresset för dessa kurser genom att hjälpa de klubbar, som ha en folkskolekurs i gång. Man kan hjälpa på avstånd både med böcker, papper, pennor, premiegåvor och — naturligtvis — kontanter.

Det hänger ofta nog på en enda lärares intresse för saken, att en sådan kurs kommer till stånd, och det är de organiserade esperantisternas självklara plikt att understödja en sådan lärares strävanden. Det betyder ingenting om detta stöd för dagen måste lämnas till en kurs långt borta från klubbens eget verksamhetsområde. Om en kurs genom understödjande intresse från en klubb i andra ändan av landet kan få ett tillskott som stimulerar dess verksamhet och gör den känd och uppskattad på kurs-orten, kan detta dra med sig intresset för nya kurser på andra håll, så småningom i allt vidare ringar, och till sist också på den generösa första hjälparens egen mark.

Vi hoppas att i följande nummer bli i tillfälle att komma med rapport från folkskolekurser, som äro i gång, och därmed ge klubbarna adresser på experter, som kunna lämna uppgift på både vart man skall vända sig för att ge hjälp — och för att få hjälp — i denna dagens stora uppgift.

Låt detta till en början bli punkt n:r 1 på nästa klubbmöte.

Veiko Johannes.

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. H. j. Dahlén.

(daŭrigo.)

La patrino atingis al norvega teritorio, kaj tie ŝi staris ĉirkaŭata de la idoj, ĉio kio restis de ŝia posedaĵo. Dum multaj semajnoj sekvis transportoj de restadejo al restadejo, elĉerpigaj veturoj laŭ la fjordoj, ĉiam novaj dormolokoj, novaj manĝiglokoj, novaj homoj. Ŝi kun la infanoj kaj kelkaj aliaj fuĝantaj familioj akompaniĝis. Ili estis severe izolitaj de la helpantaj kaj oferemaj homoj, kiuj ne komprenis ilian strangan finnan lingvon. Ĉio estis nova kaj malkutima al ili, la manĝaĵo, la loĝejoj, la okupoj de la popolo je fiŝkaptado kaj ŝipirado, sur la bordo kaj en la dometoj. La patrino rakontis, ke ofte estis neeble al ŝi resti kuraĝa, kvankam ŝi pro la infanoj tion volis. Ŝi sentis sin forlasita kaj senhelpa, ne sciis kie estas la edzo aŭ ĉu ŝi iam revenos al la jam tiel dezirinda laborego sur la malgrasa grundo de Salmijärvi.

Veiko Johannes kaj la aliaj infanoj tamen baldaŭ alkutimiĝis al la novaj cirkonstancoj. Estis multe da strangajoj por vidi ĉe kajpontoj kaj bordobudoj, kaj ĉiutage ili travivis aventurojn kaj okazaĵojn plej mirindajn. Tute ne estas tiel malgaje fuĝi, kiel senĉese grumblas la patrino kaj aliaj.

En tago komence de la nova jaro oni fine fariĝis pli loksida en restadloĝejo, kiu estis aranĝita por la centoj da finnoj, kiuj dum la neforgeseblaj decembraj tagoj devis forlasi hejmon kaj laboron en Salmijärvi. Tiu restadloĝejo troviĝas ĝuste en Saltdalen ĉe niaj najbaroj. Kaj tie oni sentis sin bone kaj oportune — se nur ne estus la necerteco pri la estonto, kaj se ne estus tiel malmultaj la sciigoj pri la edzoj kaj filoj ĉe la fronto kaj pri aliaj parencoj, kiuj kune kun ili estis dispelitaj per la ekventegoj de la vintromilito. Ĉu ili vivas?

Kaj kiel estas pri la lando?

Kaj kiam fine la liberiga sed paraliziga paco estis farita kaj Finnlando atendis la siajn ree hejmen, en la restadejo oni komencis pretiĝi por reveturo al la trarabitaj farmetoj ĉe Petsamo. Sed multajn formalajojn oni devis entrepreni, kaj la tempo pasis. Antaŭ ol la finnoj havis tempon komenci la vojaĝon hejmen, kun subita furiozo la malfeliĉo superis la landon de la gastigantoj.

La valo, kiun ili iom post iom lernis ŝati, la valo, ĉirkaŭata de neĝaj abruptoj, estis fariĝinta ilia rifuĝejo. Veiko Johannes kaj la ludkamaradoj sin sentis tute hejme sur la deklivoj apud la restadejo, precise sciis, kie estas la plej bona skideklivo kaj ĉiuj kaŝejoj en mastrumaj domoj kaj budoj. La virinoj iom konatiĝis kun la edzinoj en la biendomoj, kaj oni jam sin sentis malpli fremdula en la valo.

Nun ĝi rapide pleniĝis de anglaj trupoj, kiuj estis enloĝigitaj en la domojn. La germanoj alpremiĝis. Ŝajnis, ke estos batalo. Mem la gastigantoj devis kunmeti siajn posedaĵojn, peli la bovinojn el la bovinejoj kaj rapide iri supren en la montaron. Neniu plu havis tempon por la rifuĝantoj en la restadejo. Eĉ ne eblis doni al ili manĝaĵon kaj helpon. En la restadejo la provizoj pli kaj pli malgrandiĝis. Fine oni sin vivtenis nur per kafo kaj pano. Tiel oni ne povis daŭrigi . . .

Estis tiam, ke iu ekhavis la ideon, ke oni transmigru al Svedujo. Tie oni certe estos akceptataj, ricevos manĝaĵon kaj loĝejon, ĝis estos eble revojaĝi orienten. Cetere ja necesis ankoraŭfoje eviti la militon.

Malmulton oni sciis pri la vojo tien transen. Nur tio, ke ĝi kondukas tra altmontaraj vastaĵoj kun profunda neĝo kaj ke troviĝas ripozkabanoj je kelkmejla distanco. Pri tio, kiel estas en la vilaĝoj transe de la altmontaro, ili sciis nenion. Sufiĉis por la finnoj, ke tie loĝas svedoj.

Ili ne sciis ke de la lasta plugita vojo sur la norvega flanko estas okdek kilometroj ĝis kie oni ree atingas veran vojon. Okdek kilometroj por la piedoj paŝadi en malseka neĝo, kiom ajn malgranda estas la ŝuo.

Veiko Johannes elŝiriĝis de siaj ludoj kaj de tuta la mondo, kiu tiam estis lia. Eĉ ne la sledeton, kiun li donace ricevis de la norvega knabino, li povis kunpreni, la sledeton, kiun li amis pli ol ion alian, kion li povis kapti per la malgrandaj manoj. La plenkreskuloj estis maltrankvilaj kaj havis grandan urĝon. Germanaj aeroplanoj grupe velis super la valo.

Oni startis en grupoj de po 30 ĝis 40 personoj, grandaj kaj malgrandaj. Jam ne estis demando pri tio, ĉu oni volas iri aŭ ne. Oni devis. La bataloj — oni aŭdis la tondron — la malsato kaj la teruro ilin forpelis. La duan fojon dum kelkaj mallongaj vintraj monatoj oni fuĝis por malproksime en fremda lando serĉi rifuĝejon.

Unuopaj norvegoj akompanis la finnojn. Sed nur pli poste la najbaroj mem venis en pli grandaj grupoj.

Venis sendito kun la novaĵo, ke la finnaj familioj estas survoje. Ni tute surpriziĝis. Ni vere ne multon sciis pri ili kaj pri la okazaĵoj, kiuj forpelis ilin trans la montegaron. Sed tiuj, kiujn koncernis la afero, estis tuj pretaj. La domojn, kiuj laŭplane estus uzataj kiel enloĝejoj, oni pretiĝis. Oni alportis manĝaĵon, hejtigis la banejon, kaj la helpantaj virinoj faris litojn de fojnmatracoj, feltoj kaj purega tolaĵo.

La distrikta flegistino veturis al la lasta montdometo. En akompano de la distrikta prokuroro mi sekvis por renkonti la fuĝantojn. Patrolo da viroj, alkutimiĝintaj je la montaro, ekiris al la limo por serĉi la finnojn. La unuan grupon ili trovis, kunpremitan en malgranda, neĝokovrita ripozkabano en intermontara valo. Tiam la homoj estis la duan tagon survoje, la kunportita manĝaĵo estis konsumita, kaj lacaj kaj malsataj ili sidis dense kunpremitaj ĉe la fajro sur la pratempa ŝtonplato kaj sekigis siajn vestojn. La aero estis malpura en la negranda ĉambro. Haladzis de malseko kaj respirado.

Ne mirinde ke tiuj migrantoj estis senvolaj kaj malkuraĝaj. Sur sia vojo ili renkontis grandegajn montojn, kovritajn de profunda neĝo, kiu nun printempe estis degelanta kaj vastaĵojn pli dezertajn ol ili estis supozintaj. Ili peze iradis kaj neniam kredis vidi ian plibonigon en la situacio. La infanoj estis elĉerpitaj post la nekutima streĉado. Ili ploris aŭ obstinadis aŭ senvolaj pro laco kunfalas. La pli aĝaj en siaj malsekaj vestoj sidis tremantaj pro malvarmo kaj rigardis tra la malfermaĵo en la muro al la montego kaj la senfina vojo, kiun oni havis antaŭ si. Kaj cerbumis kaj konsiliĝis.

Certe ili sentis ĝojon, kiam la patrolo venis kun manĝaĵo kaj espero. Sed ilia lingvo ne ebligis al ili esprimi la dankemon, kaj iliaj rigidaj finnaj vizaĝoj kun la nemovemaj lipoj ne kutimiĝis per mimiko esprimi la nuancojn de la spirito. Senmovaj, grizpalaj, kun lacaj, malgajaj okuloj, ili kaŭris sur siaj lokoj, silente kaj serioze akceptante tion, kion la patrolo al ili donis. La viroj, harditaj, viglaj montegaranoj, estis kortuŝitaj.

Por la viroj de la patrolo nun sekvis peniga laboro. Ili kunprenis la virinojn, la maljunulojn kaj la infanojn trans la montaron al la unua sveda dometo. Ne nur tiun vesperon sed ĉiutage ili devis fari egalan, penigan migradon, ĝisgenue paŝante en malseka neĝo, al la limo kaj reen, por venigi helpon al bezonantaj fremduloj. Mi sentis grandegan admiron pro la insisteco kaj gaja decido per kiuj ili finfaris sian taskon. Por helpi ili havis veran volon.

Kiam la finnoj pene transiris al la unua intermontara dometo, — maljunuloj, patrinoj kaj infanoj piede, sed la plej malgrandaj sur la fortaj brakoj de la viroj — ili ricevis bonan manĝon kaj povis ripozi kaj varmiĝi. Fariĝis malvaste en la malgrandaj ĉambroj, kiam la fremduloj venis, sed la konkordo estis bona, danko la gastameco kaj reciproka kompreno. Tie ĉi renkontis ilin la flegistino, kiu donis la unuan prizorgon por skrapvundoj kaj stomakaj ĝenoj, streĉitaj koroj kaj dolorantaj membroj. Tien ankaŭ estis lokigita trupo da svedaj militistoj. Ili ne evitis iajn klopodojn sed kunhelpis kie ajn ili povis.

La sekvantan tagon oni daŭrigis la migradon malsupren laŭ la valo. Oni ne povis senintermite trairi longan vojon, ĉar la infanoj estis elĉerpitaj, havis dolorantajn piedojn kaj devis parte esti portataj. La maljunajn kaj malfortajn, kiuj estis plej elĉerpitaj, oni postlasis sub la prizorgado de la flegistino, sed la aliaj ĉiutage daŭrigis kelkajn svedajn mejlojn por fine atingi veran vojon.

Tiel ĉiutage venis grupo post grupo. Kun iu tia venis Veiko Johannes. Mi vere ne scias, kial mi plej bone memoras pri tiu ĉi infano inter ĉiuj aliaj en la aroj. Certe ne estis nur pro tio, ke li ŝajnis tiom kurioza kun siaj ruĝaj, krispaj haroj kaj la ostaj vangoj sub mallarĝaj, ruze duonfermitaj okuloj. Pli vere estas tiel, ke tiu fripon-

eto kun la ĉiam vigla humoro, ĉu malgaje kolera aŭ petole gaja, al mi ŝajnis bona reprezentanto por la persista finna eltenkapablo, kiu ŝajnis tiel bone tratabila ankaŭ tie ĉi en la montegara neĝo. Li havis la volon de sia popolo ne lasi sin venki, kio vere videbliĝis, kiam la patrino volis komandi lin. Tiam la malgranda sinjoro ege kontraŭstaris kaj obstinis.

Feliĉe estis, rilate al la sezono, bona vetero, varmeta aero kaj belaj tagoj, kvankam iam nebulo aŭ nebuleto. Ni staris ĉe la ne glacikovrita parto de la lago "Säddva-jaure", tie kie tiu tridek kilometrojn longa lago sin ĵetas en la ŝaŭmantan riveron "Skellefte älv", kiam la grupo kun Veiko Johannes alvenis. Supre de la torento, inter ni kaj la klaktintanta glacirando sur la lago, estis golfo da nigra akvo. Pro densa nebulo ĉio, kio estis pli fore, nur griz-en-grize videbliĝis. Ne estis videbla horizonta linio.

Ni atendis. Ni sciis ke tie en la nebulo ili venas irante trans la perfidan printempan glacian survoje de dometo, situanta je dekkilometra distanco fore ĉe la lago. Kelkaj viroj forremis sur la lago por renkonti ilin ĉe la glaciarando. Mole la remiloj kaptis la akvon, gutoj falis kaj la boatoj kun malgranda brueto fendis la kvietan, malvarman akvospegulon. Seriozaj ni staris rigardante en la grizan, nebulan vesperkrepuskon.

Tiun nokton mi ekkomprenis, kiom valoras loĝi en ne-tuŝita hejmo.

Malhelaĵo vidiĝis en la nebulo, fariĝis pli reala, saturiĝis, kreskis, ekhavis formon. Ĝi malrapide proksimiĝis, klariĝis. Ni ekvidis kelkajn virojn venantaj, peze trenanta boaton, metitan sur sledon. Malantŭe sekvas kun trenantaj paŝoj klinitaj kaŭrantaj virinaj figuroj. En la boato kuŝis la infanoj. Plej bone havi ilin en tiu veturilo sur glitiloj, se la glacio rompiĝus.

La remantoj aliĝis la glacian randon. La viroj supren-trenis la boatojn sur la glacian kaj en ilin portis la infanojn el la "sledo". La pli grandaj kaj la virinoj silente sekvis, portante ligaĵojn en la manoj kaj sur la dorsoj. La boatoj glitis trans la nigran akvon al ni. Ni helpis la fremdulojn sur la strandon kaj en la proksiman dometon, kie estis varme kaj komforte. La virinoj sidiĝis malvarmaj en siaj malsekaj vestoj ĉe la muron. La infanoj kuŝis dormetantaj sur iliaj genuoj aŭ kunfalas malstreĉe sur la plankon. Ĉe la pordo silente staris sola viro. En la kuirejo la mastrino de la domo prizorgis lian etan infanon.

La distrikta prokuroro sidiĝis ĉe tablon kaj komencis kontroli paperojn kaj fari notaĵojn. Ne estis kutima malafabla paskontrola oficisto sed kortuŝita homo, kiu akceptis grasmakulitajn paspermesilojn kaj ĉifitajn pastro-atestojn el malgrasaj, malpuraj manoj, kiuj etendiĝis super lia tablo. Same kortuŝitaj ni aliaj ĉirkaŭstaris.

(Daŭrigo.)

Helgoland — Pensilvanio.

(Traduko de mia radioparoladeto en "Bonvenanta al ni" en Halmstad julio 25a 1944.)

En la somero 1911 mi laboris en la nuntempe preskaŭ bruligita urbo Hamburg kiel ĉarpentisto. La konstrufirmo, ĉe kiu mi laboris, anoncis en iu loka gazeto ke oni deziras ĉarpentistojn por sia fortikaja konstruo sur la insulo Helgoland en la norda maro.

Ĉar mi ekdeziris veturi, nur por atingi novajn aventurojn, mi kiel eble plej rapide eniris la konstruan oficejon demandante bileton al la nomita loko, sed nur insultojn mi ricevis: "ni ankoraŭ ne estas tiel frenezaj ke ni sendas alilandulojn al niaj propraj fortikajlaboroj". Mi forlasis mian laborejon en la "Hansea" urbo Hamburgo, prenis vagonaron laŭlonge la riveron Elbe ĝis Cuxhaveno kaj de tie marvojaĝis. Post proksimume tri horoj mi alvenis al Helgoland. Tuj mi komencis labori en mia metio. Mia kunulo, vera germano, demandis min: "De kie vi venas, kamarado?" "Ho", mi respondis, "mi venas el Svedio". En liaj okuloj mi povis legi grandan surprizon, sed li konsilis min "Estu nur singardema". Tion mi ankaŭ promesis al li.

Sur barilo alta kiel muro estis pentrite je metroaltaj literoj: "Ia fotografado, desegnado aŭ simile kaŭzas punpagon de 10,000 markoj aŭ 10 jarojn en malliberejo."

Iun tagon fariĝis granda ekscitiĝo, kiam la ĉambristino de ia Kiela hotelo purigis la ĉambron de antaŭ kelkaj horoj jam forveturanta anglo. Ŝi trovis fotografajn kopiojn zorgeme prenatajn de preskaŭ ĉiu loko en la fortikajo sur Helgoland, kaŝitaj sub — la lito, sed tiam la anglo feliĉe estis jam sur internacia maro.

Laŭ tio ĉiu povas kompreni, ke ĉio, kion ni faris, eĉ preskaŭ ĉiu najlo, kiun ni enmetis, estis detale konata kaj prigardata en Londono kaj Parizo kiel hejme en Berlino.

Kelkajn jarojn poste la imperiestro Wilhelm pro timo forkuris al Holando la 11 nov. 1918 por savi sian vivon. Tiam mi troviĝis en alia mondparto, en la urbo Erie en la ŝtato Pensilvanio en Usono.

Iun vesperon mi iris en kinon. Nesciante la programon mi tre ĝojis, kiam mi sur la ekrano ekvidis ĉiun parton de mia laboro sur Helgoland, eĉ tiun sub la akva nivelo, poste la malmunto de la grandaj pafitejoj kaj ilia formovigo al anglaj kaj usonaj militŝipoj. Kiel lasta parto estis montrita vera sensacio, eksplodo detruanta la fortikajon.

Neniam mi povus pensi ke mi, 8—9 jarojn poste — en alia mondparto — hazarde ekvidos mian propran laboron forflugi en la — aeron.

J—s J—n.

Malgranda Revuo

— en fackla i en mörk tid.

Den som har det minsta sinne för vad som bär sig och lönar sig ekonomiskt skulle aldrig komma på den — för hans sätt att se! — vanvettiga idén att mitt under brinnande krig starta en ny esperantotidskrift. Den inhemska marknaden är alltför begränsad för att göra en sådan affär lönande, och utanför det egna landet är det hart när omöjligt att få någon avsättning för esperantolitteratur, så länge en effektiv avspärrning hindrar in- och utförsel av inte bara materiella förnödenheter utan även andliga. Och sådana fakta har en smart affärsman blick för.

Men det finns ju dessbättre människor, som kanske är skrallade affärsmän men i gengäld är helhjärtade idealister, som frikostigt offerar tid, krafter och pengar på den sak de gjort till sin. Till denna kategori hör **Stellan Engholm**. När han under trycket av världshändelser-

na, som ett tag hotade att lamslå allt verkligt kulturarbete och därmed även vår rörelse, kände behovet av en ny tidskrift, som kunde bjuda på stimulerande, uppfordrande läsning och genom sina impulser bli ett andligt kraftcentrum för rörelsen, då skapade han helt resolut ett sådant organ. Under halvtannat år har **Malgranda Revuo** nu utkommit som kvartalsskrift med hittills sex 32-sidiga nummer, och den som regelbundet studerat den kan utan skynt av tvekan konstatera, att Engholm trots alla svårigheter lyckats fullfölja sitt högtsyftande program: att samla enskilda esperantisters idéer, impulser och entusiasm till en hälso- och styrkekälla, ur vilken alla kan hämta vederkvickelse och stimulans, nya kunskaper och nya krafter.

Engholm deklarerade redan i sin anmälan, att han avsåg att ge enbart originalartiklar i kulturella ämnen på ett esperanto, som fyllde de högsta anspråk i fråga om språk och stil. Även den föresatsen har kunnat hållas. Inte bara utgivarens egna utan även de övriga bidragen visar den språkliga spänst och schvung, den färg och flykt, som man vant sig att förbinda med Engholms

namn. Även ur innehållssynpunkt står de omkring femtio bidragen i de sex häftena mycket högt. De omspanner så skiftande saker som noveller och dikter, skildringar från länder i krig eller under ockupation, artiklar i historia och religion, astronomi och naturvetenskap, uppsatser om fredsarbete och studieverksamhet, om den engelska folkkaraktären och om konsten att tänka och om mycket, mycket annat. Författarna representerar ett dussin länder, och en så pass internationell prägel skäms sannerligen inte för sig i våra dagars nationella isole-ring.

Stellan Engholm och hans medarbetare gör alltså sitt bästa för att uppehålla en kulturell tidskrift av högsta tänkbara syftning. Nu kommer det an på Dig och mig, om de skall få möjligheter att fortsätta sin verksamhet eller ej. Det måste sägas vara vår plikt — och en högst angenäm sådan — att ge vårt stöd åt Malgranda Revuo. Detta sker enklast genom att på postgiro 26 80 23 insätta en krona (vid rekvisition av minst 10 ex. 80 öre pr styck) eller vid årsprenumeration det fyrdubbla beloppet. Det är inte ofta en så blygsam insats ger en så riklig och värdefull utdelning som i detta fall. Alltså, kära meningsfränder landet ruht: Stöd Malgranda Revuo, för det är den ärligt värd!

Karl Söderberg.

Lingva kolono.

DAŪRIGI.

Gerdman skribis ion pri la vorto daŭrigi. Al mi ŝajnas, ke ni tre bone povas uzi la esprimon (kaj simile konstruitajn) "mi daŭrigas labori". La infinitivo en tiu ekzemplo faras preskaŭ saman servon kiel substantivo. La esprimo ne estas malpli bela ol kun substantivo, ĝi estas absolute klarencas, kaj fine ĝi redonas sencon, kiu ne estas la sama kiel en konstruo kun substantivo. Daŭrigi laboron kaj daŭrigi labori ne estas precize la sama. Kial do ne uzi tiun esprimmanieron? Se Zamenhof vivus nun kaj vidus, ke la esprimo estas bezonata, ke ĝi neniel estas dubsenca kaj ne malutilas al la lingvo, li certe konsentus.

"Programmet fortsätter". — Laŭ mia opinio la manko ne estas en esperanto sed en la sveda. Ni daŭrigas la programon, la progamo mem estas daŭrigata. El propra forto ĝi ne povas daŭrigi. En la sveda ni diras, ke barnet början skolan, skolan börjar, sed en esperanto ni diras komencas kaj komenĉigas.

"Där skogen slutade, tog myren vid" — mi traduktion: "Kie la arbaro finiĝis, sekvis (komenciĝis) la marĉo — aŭ en alia pli malpli bona maniero.

Sed nun mi volas tuŝi la ĉefan aferon. Se ni havus esperantan radiostacion, nur pedantoj dirus: La programo estos daŭrigata post du minutoj. Certe ni dirus: Ni daŭrigos post du minutoj — aŭ: Daŭrigo post du minutoj. Kaj jen estas la afero, kiu tuŝas nian tutan lingvon kaj estas gravega por ĝi.

Kiam ni tradukas, ni devas antaŭ ĉio difini la sencon de la tradukota esprimo, poste havigi el vortaro aŭ mem fabriki esprimon, kiu kiel eble plej bone redonas tiun sencon. Ni absolute ne klopodu, ke la esperanta esprimo havu la nacilingvan esprimon kiel modelon. Se okaze la esperanta konstrumaniero koincidas kun la nacilingva — bone; se ne — nenia malutilo en tio.

Ofte homoj prenis aliajn lingvojn kiel modelojn por sia propra, kaj tiu grandparte perdis proprajn bonajn kvalitojn kaj anstataŭe ricevis parte malpli bonajn. Ni svedoj grandskale uzis la latinan kaj la germanan lingvojn kiel modelojn por la nia. Certe ni iom gajnis per tio, sed se ni komparas la svedan kun la islanda, ni komprenas, ke ni ankaŭ multe perdis.

Se ni volas ĉiam laŭvorte traduki ĉiujn esprimojn, esperanto fine fariĝos nura imitaĵo de aliaj lingvoj. La fundamento de esperanto, vorte kaj gramatike, estas prenita el aliaj lingvoj. Sed tiu fundamento estas tiel bona, ke ni ne bezonas imiti per "laŭvorta tradukado", la nacilingvajn esprimmanierojn. Certe ni povas multe lerni de naciaj lingvoj, sed ni ne fariĝu sklavo de ili.

Ni traduku unualoke ne laŭvorte sed laŭsence kaj ni esprimu nin esperante, ne laŭ fremda modelo.

†

John

Fogelberg



La 28-an de jan. trafis la esperantistaron en Hälsingborg granda bato, ĉar tiam subite forlasis por ĉiam nian rondon nia amiko John Fogelberg.

Fariĝinte esperantisto per memstudado li estis unu el la fondintoj de Esperanto-Societo "La Espero" kaj fariĝis de komence ĝia sekretario, kiu li estis dum kelkaj jaroj. Post kelkajara foresto de la aktiva laboro li revenis ĝustatempe por kunhelpi en la prepara laboro por la federacia jarkunveno en Hälsingborg. De tiu-ĉi laboro li prenis sur sin la plej grandan parton, kaj ne permesis al si ripozon kaj trankvilon. La partoprenantoj de tiu jarkunveno certe memoras lin kiel la ĉie ĉeestantan kaj ĉiam helpantan servemulon. Li ĉiam estis helpema kaj oferema kaj ĉiam kun granda intereso laboris por nia afero.

La esperantomovado je li perdis interesatan kaj sindonnan laboranton.

Esperanto-Societo "La Espero" dankas vin pro ĉio.

Dormu en paco.

Fred. E. Fernström.

ELKORE.

Kiam la lando, kiu iam estis la sola imagebla centro de mia ekzisto, baraktas en la furiozo de la historia kataklismo, kiam oni sentas timon kaj angoron pro sorto de proksimuloj, urboj kaj lando (kaj landoj), oni sentas profundan amon, dankemon al Via lando kaj ties loĝantoj, kiuj radias amikan senton, komprenemon, helpemon, varmon al simpla laboranto por granda ideo. Rapide, en la minuto de la gazetfermo, sub la forta impreso de la ĵusa neforgesebla 50-jara tago, mi volas jam nun danki ĝenerale ĉiujn organizojn, klubojn, unuopulojn, ĉiujn esprimantojn de simpatio kaj bonvolo. Profunde varman dankon pro la mirinde grandaj kaj amasaj donacoj, telegramoj, leteroj. Ĉio ĉi plantas novan volon en min.

Ferenc Szilágyi.

La lasta duono de tiuj ĉi linioj kompreneble ne estas respondo al Gerdman — sed mi ekpensis pri la afero, kiam mi legis lian artikolon. Ĝi ankaŭ ne estas direktata kontraŭ Gerdman, ĉar certe li havas la saman opinion, sed ĝi estas atentigo al aliaj, kiuj eventuale ne pensis pri la sekvoj de tro laŭvorta tradukado.

Stellan Engholm.

*

La menciita frazo "programmet fortsätter nu med ett föredrag", kiun Gerdman menciis en sia lasta artikolo, estas tradukebla diversmaniere: 1) Per pasiva frazo: La programo estas nun daŭrigota ktp. 2) Ni daŭrigas la programon per ktp. 3) Prelego daŭrigos nun la programon. — La lasta estas konciza kaj rekomendinda. La pasiva formo en Esperanto estas pli longa, ol en la sveda kaj entute ofte estas multe pli praktike uzi aktivan frazon ol pasivan.

F.S.

Germana skolta konsilaro.

Vi ha haft glädjen att få ta del av följande brev till Svenska Esperanto-Institutet:

Tostarp, la 26an de januaro 1945.

Al Sveda Esperanto-Instituto, Stokholmo.

Mi volas anonci al vi, ke germanaj skoltoj fondis ĉi tie en Svedujo la "Germana skolta Konsilaro"n. Ĝis nun niaj membroj estas rifuĝintoj sed ni ankaŭ akceptos aliajn personojn. La lingvo Esperanto estas oficiale enkondukita kiel internacia helplingvo por la eksterlanda korrespondado. Ĉiuj membroj de la konsilaro kaj de la "Germana Skolta Ligo" povas akiri la interpretistan insignon per Esperanto, eĉ ĉiu grupestro devas ekstudi Esperanton, kompreneble ankaŭ ĉiuj pli altrangaj estroj. Nia laboro en Svedujo komencis je la 15-a de januaro 1945, kiam ni fondis la "Germana Skolta Konsilaro"n en la rifuĝintejo de Tostarp. Ni intencas fari propagandon por la afero inter la germanoj en Svedujo samtempe ankaŭ por Esperanto. Ĝis nun eklernas 18 germanaj rifuĝintoj nian lingvon. La celoj de la konsilaro skolta estas jenaj:

- 1) La sistemo de la germanaj skoltoj aliĝas al tiu de germanoj en Svedujo.
- 2) Krei novan germanan skoltan ligan en Germanujo, kiu estos rekonata de la tutmonda skoltoŝefo.
- 3) Solidarigi la rilatojn kun ĉiuj skoltaj movadoj de la mondo.
- 4) Skoltestran instruadon al junaj germanoj, kiuj estos kapablaj gvidi post la milito nian junularon sur la ĝusta vojo al libereco kaj vera demokratio.
- 5) Eldoni senpartian skoltan bultenon kiel instruadfoliojn.
- 6) Aranĝi tendarojn, kunvenojn ktp.

Postskribado.

1) La sistemo de la germanaj skoltoj aliĝas al tiu de fondinto de la tutmonda skolta movado Lordo Baden-Powell.

2) Membro de la "Germana Skolta Konsilaro" povas fariĝi ĉiu germano sen diferenco de raso, religio kaj profesio. Ankaŭ germanamikaj eksterlandanoj povas laŭ deziro aliĝi al la germana skolta ligo, precipe al la sekcio de la esperantista fako.

Tiaj estas niaj celoj. Ni esperas ke ni sukcesos ankaŭ ricevi bonan kontakton kun la svedaj esperantistaj skoltoj. Ni bonvenigas ĉiujn fratojn de la mondmovado ke ili helpu al ni rekonstrui grandan germanan skoltan movadon. Ni ĝojus, se la iamaj membroj de la sekcio de esperantistaj skoltoj aliĝus amike al nia movado. Estas certe bonega propagando por la germanaj skoltoj aŭ por tiuj kiuj volas iĝi skoltoj. Ni forte esperas, ke vi povas fari per tiu ĉi artikolo iomete propagandon en "La Espero". Bedaŭrinde ni rifuĝintoj vivas en malbonaj cirkonstancoj. Ĉar estas granda manko de mono ĉe ni, ni ne estas kapablaj aliĝi al SEF, kvankam ni dezirus tion.

Rudolf Petri

Ĉefskolto kaj prezidanto de la "G.S.K."

Tostarp, Tormestorp, Skåne.

Vi behöva icke särskilt påpeka för klubbarna hur lämpligt det skulle vara att taga upp denna fråga till behandling och överväga, på vad sätt man skulle kunna hjälpa den spirande rörelsen: korrespondensadresser, böcker, tidningar, kontanter?
R e d.

Finnlando invitas al somerkurso,

Finna esperanto-instituto kunlabore kun finna ABF aranĝos somerkurson en la belsituata Punkaharju dum la tempo 8—14 julio. La kurskotizo estas fmk 600:— por finnoj kaj kr. 60:— por svedoj. Tiu kotizo ankaŭ inkludas loĝon kaj manĝon dum la kurso.

Prelegos s-roj Setälä, Huuskonen, Salokannel kaj eble ankaŭ Vilkki. Krome iu svedo. Studtemoj: gramatiko, historio, propagando, literaturo. Kiel distron la gastigantoj prezentas ekskursojn, naĝadon, vesperfestojn ktp. Kaj post la kurstempo oni aranĝos ekskurson al la proksima urbo Savonlinna, kie precipe estos rigardata la fama Olavonlinna.

Aliĝoj kaj informpetoj estu direktotaj al s-ro Kaarlo Jokinen, Töölöntullinkatu 7.A.2, Helsinki, Finnlando.

USA vokas.

Kiel fakdelegito de IEL por kooperativaj aferoj mi el Usono antaŭ kelkaj tagoj ricevis leteron, el kiu mi citas parton:

"Mi estas ano de grupo da gejunuloj, kiuj havas grandan intereson pri la konsumadaj kooperativoj. Kaj ni kaj niaj gepatroj estas kooperativo-membroj. Ni kunvenas je malgrandaj grupoj duonmonate por lerni pri la kooperativoj kaj por helpi la movadon. Inter ni estas la idealoj pri mondpaco, ekonomia sufiĉeco kaj tutmonda frateco. La aĝo de la anoj estas inter dek kvin kaj dudek jara. La nombro da anoj estas proksimume ducent, kaj ili loĝas plejparte en tri urboj: Chicago, Detroit kaj St. Louis.

Nun kelkaj el nia grupo (eble dudek) komencas lerni Esperanton. Ni esperas, ke Esperanto povus iĝi ilo por mondpaco kaj por amikeco inter kooperativaj gejunuloj de diversaj landoj. Espereble, post ne longe, kelkaj el ni povos uzi la lingvon sufiĉe bone por internacie komuniki.

Jen la peto: Ĉu estas ankaŭ en Svedujo gejunuloj, kiuj havas intereson pri kooperativoj kaj kiuj povas uzi Esperanton?

Estus bona ideo, se kooperativaj gejunuloj en via lando kaj nia povus interkomuniki per Esperanto. Tiu ideo helpus disvastigi Esperanton, unuigus diversajn partojn de la kooperativa movado, kaj estus malgranda paŝo al mondpaco."

Poste li petas, ĉu mi povas al li sendi adresojn de junuloj, kiuj volas korespondi kun ili.

Ĉu vi bonvole povus helpi al mi, se estus eble per kelkaj vortoj mencii pri la afero kaj peti interesulojn sendi siajn nomon kaj adreson al mi por ke mi poste povu sendi ilin al la samideano en Usono.

Eric Fredin

N:a Rostorpsgatan 1, Malmö.

La letero parolas por si mem. Certe interesataj esperantistoj kun ĝojo sendos siajn adresojn al s-ro Fredin.

Esperanto kulturlingvo.

La demando de skeptikuloj, ĉu ekzistas en la esperanta literaturo io valora, kio ne jam ekzistas en la aliaj lingvoj, estas bonege respondata de la fakto ke la unua germanlingva traduko de "La Faraono" de Boleslaw Prus, estas ĵus eldonita, en 1944, de la eldonejo Otto Walter AG, Olten (Svisujo), (almenaŭ laŭ la titolo), dum la Esperantistoj jam de post 1907 povis legi tiun tre valoran verkon en la majstra traduko de Kabe. La rimarkoj de la eldonanto sur la propaganda kovrilo estas tre interesaj; tie staras: "Unua germanlingva eldono de la granda pola majstroverko. Tiu ĉi mondliteratura romano pri la sorto de diktatoroj travivis en ĉiuj kulturlingvoj eldonon post eldono."

En sia epilogo la eldonanto diras: "Prezenti la aŭtoron Boleslaw Prus al germanlingva legantaro estas enviinda kaj samtempe hontiga tasko. Kio kulpas ke ĝis hodiaŭ neniu prenis sur sin la honoran devon doni al tiu ĉi majstro de la pola romano, kiun la literaturhistorio metas apud Sienkiewicz kaj Reymont, la de li merititan lokon en la literaturo tradukita en la germanan lingvon? Tiaj ekzemploj pliiĝas la embarasan suspekton ke la t.n. mondliteraturo estas nur la literaturo de la grandaj potencoj."

Piednota listo mencias la aliajn tradukojn en naŭ lingvoj: ĉeĥa en 1899, rusa en 1899 kaj 1938, angla en 1902, franca en 1905, nederlanda en 1903, esperanta en 1912 kaj 1925, kroata en 1923, hungara en 1929 kaj 1942, itala en 1934. Kaj — kiam ĝi aperos en la aliaj 21 europaj kulturlingvoj? Kiam ĝi aperos en la aliaj 2,991 lingvoj ekzistantaj en la mondo? Ni atendu!
J.R.

SEIF Kolono

OMBUDSMANNAFONDEN.

Nedanstående fem inbetalningar äro de sista, som enligt Karlskoga-mötets beslut ha fått disponeras för den treårsperiod, som utgick den 30 juni 1944: H. Andersson, Nässjö, kr. 2, Ragnhild Carlsson, d:o, 2, Greta Svensson, d:o, 2, Ingeborg Svensson, d:o, 2, Lisa Åstrand, Nynäshamn, 6. S:ma 14:— . Efter den 1 okt. 1944 har inbetalts av Edvin Svensson, Upsala, 5:00.

Sistnämnda inbetalningar jämte kommande inbetalningar skall enligt ovannämnda mötes beslut fonderas i avvaktan på beslut av framtida årsmöten om det ändamål, för vilket fondens medel skola användas.

M. Fej de.

BLIV IEL-MEDLEM!

Alla tro vi, att detta år skall bjuda oss fred. Och alla hoppas vi på att våra förbindelser med utlandet nu skall kunna återknytas. Det är då av största vikt, att i tid ha fått kontakt med den internationella esperantorörelsen. Detta sker bäst genom att ingå som aktiv medlem i Internacia Esperanto-Ligo (I.E.L.) genom att abonnera på IEL:s årsbok, pris 3:— kr., eller genom att anteckna sig för såväl dess årsbok som tidning, pris sammanlagt kr. 8:—. Insänd avgifterna till Öfdelegito Karl Wästfelt, postgiro 151288, Stockholm 32.

På de platser, där det ej finns utsedd delegito de IEL, uppmanas esperantoföreningen att utse sådan och därom meddela herr Wästfelt.

"BASIC SCHWYZERDUTSCH".

Sub la titolo "Basic Schwyzerdutsch" ("Basika svisgermana lingvo") la svisa humora gazeto "Nebelspalter" mokas la projekton "Basic English". Menciante tiun ĉi projekton, la aŭtoro skribas ke li antaŭ nelonge legis en la gazetaro ke la kimre parolantoj de Britujo volas krei "Basic Welsh". Do, diras la aŭtoro, kial ni restu malantaŭe? Ni svisoj faru same! Ni kreu basikajn dialektojn bernan, zurigan, baselan ktp., tiel ke la malfacila vorto "butero", kiun ŝajne neniu povas plu memori, simple anstataŭiĝos per la ĉirkaŭfrazo "flava, mola, porciata manĝaĵo kiun antaŭe oni havis por ŝmiri sur la pano"; kaj anstataŭ la tre malfacila esprimo "batita kremo" ni diros: "la blankaj, kun aero miksitaj grasopartoj de la lakto, kiujn ni ne vidis jam de post 4 jaroj". Per tiaj simpligoj kaj per la praktika svisa vorto "Chaib" (signifas proks. "diablo") ĉiuj svisoj povos esprimi ĉion ajn sub la luno kaj ilia lingvo fariĝos konkurkapabla mondlingvo!

J.R.

IEL-stjärnan

den internationella esperantorörelsens (Internacia Esperantista Ligo) igenkänningstecken, får bäras av varje esperantist, som är medlem av någon av Svenska Esperantoförbundets klubbar eller är direkt ansluten som medlem till IEL.

Femuddig grön stjärna med inskription IEL.
Pris 1.25 plus 35 öre för oms. och porto.
(Obs. förskottslikvid.)

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578.



Meddelande från Esperanto-Institutet

INFORMOJ DE LA INSTITUTO.

Ekzamena skribtago.

Dimanĉe la 18 marto okazos la skribaj provoj por la esperanto-ekzamenoj. Anoncu vin antaŭ la 8 marto!

Somerkursoj.

Dum la venonta somero la instituto planas 3 somerkursojn (= somerajn restadejojn), nome en Björkås, Norrköping (Granebo) kaj Kiruna. Preparu vian aliĝon!

Somerkurso en Finnlando.

Vidu apartan artikoleon pri tiu kurso!

S.D.U. (Samarbetskommittén för demokratiskt uppbyggnadsarbete).

La instituto decidis kunlabori kun "la tutlanda komitato por demokratia restariga laboro", speciale koncerne somerkursojn internaciajn. Jam tiun ĉi someron la en Svedlando troviĝantaj rifuĝintoj havos event. eblecon partopreni la nun planitajn kursojn.

Jarkunveno de la instituto.

La 7 jan. jarkunsidis la instituta estraro. La direkcio informis per sia jarraporto i.a., ke dum la jaro 1944 ekzameniĝis 16 personoj por la supera kaj 30 por la elementa ekzamenoj. Instruisto O. Svantesson en Göteborg ricevis la komision esplori la nombrojn de instruistoj en Svedlando, kiuj estas kapablaj instrui esperanton. Dum la studsezono 1943—1944 la koresponda kurso "Esperanta studservo" kolektis 223 partoprenantojn. Estis aranĝataj somerkursoj en Björkås kaj Jursla (Granebo), partoprenis entute 64 personoj. Kursatestoj estas presitaj je dispono al kursgvidantoj, kiuj deziras je kursfinoj disdoni tiajn atestojn al la partoprenintoj. Radio-dissendoj pri aŭ en esperanto ne okazis, sed en kunligo kun la programpunkto "Månadens magasin" instruisto Einar Dahl faris mallongan esperanto-lecionon kun siaj lernejinferoj.

Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20
Telefon 14 93 43

Göteborg V
Postgiro 3 14 30

FOLKSKOLEKURSER.

Den aktuala frâgan om undervisning i främmande språk vid folkskolorna var föremål för behandling vid årsmöte med Skövde Esperantoklubb den 16 jan. Esperantisterna hälsa med tillfredsställelse den utveckling, som tar sikte på att i största möjliga mån bibringa folkskolans elever insikter i främmande språk. En synpunkt, som dock esperantisterna önska framföra, är att språkundervisningen över huvud taget skulle vinna åtskilligt på att såsom grund för studierna i främmande språk först låta eleverna taga del av undervisningen i esperantospråket. Eleverna i de sista klasserna, där undervisning i främmande språk skulle komma i fråga, skulle genom inledande studier i esperanto tillägna sig en stabil och säker kunskap i allmän grammatik, vilket i hög grad tjänar att befärma modersmålets rätta behandling och sedermera underlättar inlärandet av något annat, främmande språk. Esperantos internationella ordförråd kommer vidare att bli av direkt nytta för fortsatta studier.

Esperantoklubben kommer att hos folkskolestyrelsen hemställa, att esperanto måtte tillåtas som frivilligt ämne utanför läroplanen. Undervisningen skall ledas av examinerade esperantister med Svenska Esperanto-Institutets behörighet att undervisa. Vidare skulle undervisningsnämnden beredas tillfälle att inspektera och genom någon esperantokunnig ledamot i nämnden eller folkskolestyrelsen följa undervisningen. Man tror, att intresse skall finnas för saken såväl bland ungdomarna själva som deras målsmän, alldenstund man genom dylik undervisning både i svenska folkskolor och i utlandet fått påtagliga bevis för esperantospråkets betydelse i rent språkligt allmänbildande hänseende.

SVEDA KRONIKO

MALMÖ. 13.12.44 ordinara kunveno. Ĉe la kaftrinkado Luĉio venis, programpunkto egale solena ĉiun jaron. La kristnaskofesto okazis sabate la 13-an de jan. en la fest-salono de la bontemplanoj. La festo enkondukiĝis per pianoludo de s-ino H. Atlas, bonvensaluto de s-ro Jan Strönne kaj kanto de la esperantohimno "La Espero" de ĉiuj. Sekvis tre bonhumora laŭtlegado skandialekte de s-ro S. Persson kaj gajaj maristkantoj de s-ro S. Bergström. La konkurso, kiu estis ligita al la programpunkto "La vivanta ŝarado", gajnis s-ro G. Henriksson (granda skatolo kun ĉokolado). La ekstranumero estis ĉarma prezentado de f-ino L. Lundborg. La teatra grupo tute ravis la publikon per sia prezentado "Mottagningstimmen". La amuza teatraĵo daŭris proksimume tri kvaronhorojn. Post la kaftrinkado sekvis kristnaskaj rondodancoj. En iu paŭzo s-ro Strönne aranĝis tre nervostreĉajn konkursojn inter sinjoroj kaj sinjorinoj. La konkurso konsistis el kulerĵetado, terpomkolektado kaj demandsporto. Ke la sinjoroj gajnis certe estis nur bonŝanco, tion opiniis almenaŭ la sinjorinoj. La plentrafa kristnaskofesto finiĝis per moderna danco. **H-dur.**

GRUPO ESPERANTISTA DE STOCKHOLM.

Kunvenoj en la januaro. La 3an de januaro ni aranĝis nian Kristnaskan feston en la kutima stilo kun donacoj kolektitaj de la membroj kaj laŭhazarde donacitaj al ili de la Kristnaska koboldo, kies rolon lerte ludis S:ro Morariu. La troaj donacoj estis foraukciataj. La 10an ni eldonis vivan gazeton, plejgrandparte de humora enhavo. Ĝi estis kompilata tre rapide, ĉar la redaktoroj ne sciis antaŭ la kunveno mem la enhavon de siaj artikoloj. Same improvizita estis la specialeldono de la viva gazeto la 17an, ĉar la intencita Svisa Vespero nebligis pro malsano de la prelegonto, S:ro Morariu.

La 24an okazis nia jarkunveno sub la gvidado de la honorprezidanto Paul Nylén. Post detala jarraporto de la estraro sekvis la kasraporto, kiu montris netgajnon de kr. 37:97 kaj finkapitalon de 501:11. Laŭ la revizora raporto la jarkunveno liberigis la estraron de ties respondeco. La novelektita estraro estas la jena: prez. Sigvard Håkansson, unua vicprez. K. I. Moberg, dua vicprez. Elisabet Olsson, sekr. Vilhelmo Bartel, vicsekr. Karl Erik Karlsson, kasisto Martin Eriksson, vickasisto Edit Bohlin. La mastrino Alfhild Svedmark, la bibliotekisto V. Bartel kaj la librovendistino Greta Lindwall estis reelektataj. Revizoroj: Per Svensson, Sune Ahlm, anstataŭantoj: Helmi Josefsson. Tore Sjöblom, Reprezentantoj en la kunlabora komitato Harry Törnskog kaj Sune

Ahlm. Membrokotizoj kiel antaŭe. Hans Andersson fariĝis honora membro. Laŭ propono de Moberg ni serĉos permeson ĉe la "ŝtata komerskomisiono" por donacpakaĵoj al Norvegujo.

La 31a estis dediĉata al lingvaj ekzercoj helpe de lumbildserioj. **B.**

VETLANDA ESPERANTOKLUBB jarkunvenis 30.1. Jar- kaj kasraporto estis aprobataj. La estraro: prez. Gunnar Karlsson; kasisto Arne Sjögren; sekr. Thure Malm; ceteraj membroj: Erik Karlsson kaj Gustav Karlsson. Revizoroj: Reinhold Hansson kaj fraŭlino Vera Norberg. Del. de IEL Gunnar Karlsson kaj por ABF Torsten Ekvall. Oni decidis kunveni ĉiumarde por parol- kaj tradukekzercoj kaj aĉeti kelkajn librojn por la biblioteko.

M-m.

VIMMERBY. Studiecirkeln i esperanto, som i oktober började med offentlig provlektion av den ungerske författaren, dr F. Szilágyi, hade torsdagen före jul sitt sista sammanträde för höstterminen. Dr Szilágyis eminenta förmåga och lärobokens roande bilder ha jämte deltagarnas flit och intresse bidragit till det utmärkta studieresultatet.

Vid ett samkväm blev kursledaren hjärtligt hyllad av kursens deltagare på både svenska och esperanto med tal, sång och spel. I sitt svarstal uttryckte dr S. förhoppningen om fortsatta studier under den kommande terminen.

Dragning har också ägt rum i klubbens lotteri. Vinnare av det vackra konstverket, vilket utförts av fröken Rigmor Svenoni, blev hr E. Samuelsson, som köpt lotten med lyckonumret 125.

ETT FÖRSLAG.

Alla torde vi väl vara ense om hur stimulerande det är med gemensam sång på våra sammankomster inom föreningen eller ver helst vi annars träffa samman. Men hur är det med vårt förråd av sånger på Esperanto? Bör-

Kursledare!

Har ni tänkt på hur värdefullt det är att på sidan om läroboken ha en liten läsebok, ur vilken ni redan efter några lektioner kan börja så sakta låta eleverna vänja örat vid löpande text, vid melodin? Någon hemläxa ur den är ej att rekommendera — kursledaren läser, översätter och kommenterar, eleven följer med i sin bok, och både ord och grammatik smyger sig omärkligt in i medvetandet. Vi ha tre sådana böcker, vars text särskilt lämpats för nybörjare:

BARBRO KAJ ERIKO, en intressant korrespondens mellan en österrisk esperantist och en svensk kvinnlig sådan **0.70**

KUDLAGO, en enkel och trevlig berättelse om en eskimåpojkes dagliga liv o. äventyr. **0.85**

PER MOTORCIKLO en tri landoj. En intressant skildring av 4 svenska ungdomars äventyr under en motorcykelfärd till Tjeckoslovakien. **0.85** Priserna inkluderar oms. och porto.

Vid postförskott tillkommer postförskottsavgift.

Vi rekommendera alla kursledare att försöka detta värdefulla komplement till kursarbetet.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578.

Hasse L:s

Humoresker på Esperanto.

Översatta av Dr F. Szilágyi.

"Hans konst kan visserligen vara burleskt grotesk och hans blick på medmänniskan infernaliskt skarp, men hans förmåga att se det komiska i de minsta bagateller är beundransvärd. Han är en de bizarra effekternas mästare och han ser på sitt offer med djup, psykologisk blick och med filosofens förståelse. Man förnimmer bakom ordet mera det förlåtande löjet än det gisslande riset." — — —

EN NÖJSAM BOK
OCH EN GOD BOK.

Pris 2.25 (inkl. oms. o. porto) vid förskottslikvid
,, 2.50 (inkl. oms. o. porto) vid postförskott.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071 Stockholm 19 Postgiro 578

Ändrat postfacknummer.

Förlagsföreningen Esperantos Postfacknummer är fr.o.m. den 1 februari ändrat till
19071, Stockholm 19.

Ni skriver brev

någon gång. — Ett sigillmärke på klaffen är prydligt och, när det gäller esperantomärkena, av propagandaeffekt. Vi ha två sorter:

SEF:s propagandamärken i 3-färgstryck:

Pr 100 st. inkl. oms. och porto 2.75.

Propagandamärken med grön stjärna på vit botten
Pr 100 st. inkl. oms. och porto 0.75.

Vid postförskott tillkommer 0.25.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578.

ja de inte bli en smula uttröskade vid det här laget? Jag skulle därför vilja komma med ett litet förslag. Kunde inte Förbundet eller Förlagsföreningen eller kanske båda tillsammans utlysa en tävling om de bästa original-sångerna på Esperanto till kända, pigga och lättsjungna svenska melodier. Varför original på Esperanto? Jo, därför att man på det sättet kan få fram naturliga och språkligt goda texter. Utan att på något sätt vilja kritisera de översättningar av svenska sånger, som vi nu ha till vårt förfogande i våra sångböcker, skulle jag ändå våga påstå, att många av dem skulle vinna avsevärt i värde, om de vore fria från alla de svenska person- och ortsnamn, som de nu äro fulla av. I varje fall skulle de ur internationell synpunkt vinna härligt. Likaså skulle det vara en fördel, om man slapp att i ett givet versmått pressa in ett visst betydelseinnehåll och vissa rim. Det borde vara lättare att till någon given melodi dikta fritt på Esperanto. I somliga av våra översatta sånger förekommer det också, bortsett från direkta språkfel, att orden på grund av rytmen blir felaktigt betonade. Särskilt ofta händer det att trestaviga ord måste betonas på första stavelsen i st. f. den andra. Beträffande textval skulle jag t. ex. vilja föreslå en sång om resp. årstider, en vandringsång, en sjömansång osv. Några direkta lovsånger till "nia kara Esperanto" torde däremot vara överflödiga. Hur tävlingen i övrigt bör ordnas med pris o.dyl. överlåter jag till vederbörande att bestämma. Ett oavvisligt krav måste dock uppställas. Sångerna måste vara språkligt oantastliga, naturliga och lättsjungna, och så bör det ju också vara något förnuftigt innehåll i dem.

Birger Gerdman.

Nova adreso:

Ajo Alinger, Pokalvägen 4, Reimersholme, STOCKHOLM Sv.

Tel. 44 44 00. Postgiro 26 57 56.

Korespondado

25 svisaj esp.-komencantoj deziras korespondadi. La lernantoj havas aĝon de 17 ĝis 40 jaroj. Skribu al **Petit-pierre**, 14 rue Chauvet, Genève, Svisujo.

Finna instruistino deziras korespondadi kun svedinoj. Instruistino **Hilja Heinonen**. Adreso: Finlando, Pori, Uusi-koivisto koulu.

RAKKLINGAN

"Esperanto Tutmonda"

i reklamförpackning med Esperanto-text. En tunn, skarp och hållbar klinga.

Pr 5 st. inkl. oms. o. porto 1.30

Pr 25 st. inkl. oms. o. porto 5.10

Vid postförskottslikvid tillkommer kr. 0.25.

När ni rakar er, använd Esperantoklingan! Ni hjälper till i propagandan.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Fack 19071, Stockholm 19. Postgiro 578.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:35.
Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrens-vägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

SOM VANLIGT

utsändes detta nummer till alla förutvarande prenumeranter — marsnumret däremot endast till dem som förnyat prenumerationen. Nu hoppas vi att det inte ska bli någon av våra hittillsvarande prenumeranter som ska ställa till så att de bli utan marsnumret.

Visste alla meningsfränder vilket arbete och kostnad de bespara oss genom att i tid sända in sin prenumeration skulle de aldrig mankeras.

Således: Priset 4 kr., postgiro 578.

Förlagsföreningen Esperanto.

ESPERANTO-AIRUT. — EN GLAD NYHET FRÅN FINLAND.

Från Finland har kommit nr 1 av en ny esperantotidning, "Esperanto-Airut". Den djärve, som vågat sig på försöket, är Otto Pellikainen i Seinäjoki, och han deklarerar, att hans avsikt är att samla esperantisterna i Finland kring en gemensam tidning för att på nytt få till stånd en handlingskraftig esperantorörelse i vårt östra grannland. Vi lyckönska våra kamrater i Finland och hoppas på framgång för den djärve.

Tidningens första nr är fyrsidigt och innehåller två esperanto-program-artiklar och en del esperantopoesi. I övrigt artiklar på finska om esperantos historia, om dess införande i skolorna m. m.

ANEKDOTOJ.

— Kaj li, la lignajisto, kiu mortis. Ĉu vi aŭdis, ke li fordonis ĉion, kion li postlasis, al infanhejmo?

— Estis tre bona faro! Kiom estis?

— Kvin infanoj!

— La mondo estas malbona!

— O jes, sed ĝi povas pliboniĝi.

— Ho ne, almenaŭ ne tiom longe, ke ni vivas.